

Pri la vortara farado: Omaĝe al Lucija Borčić

AMO 94 en Kroatio pri vortara farado

La tradicia aranĝo "Memorialo Lucija Borčić" virtuale okazis inter la 12-a kaj 14-a de novembro 2022. "Vortara farado" estis la ĉeftemo de la ĉi-jara 7-a memorkunveno omaĝe al Lucija Borčić (26.7.1921-14.11.2015), organizita de Kroata Esperantista Unuiĝo. Prelege kontribuis Esperantistoj de Kubo ĝis Ĉinio kaj Barato. Ankaŭ ĉi-jare, kadre de la Memorialo okazis AMO-seminario, 95-a sinsekva.

Lucija Borčić, kroata esperantistino, tradukistino, vortaristino kaj poetino mortis la 14-an de novembro 2015. Kroata Esperantista Unuiĝo jaron poste komencis organizi la memorkunvenojn ĉiam aldoninte iun temon ligitan al la agado de Lucija mem.

Pro la fakto, ke ŝia vivverko estis du voluma vortaro kroat-esperanta kaj esperanto-kroata, kaj ĉar ĉi jare oni memoras 150 jaroj de la naskiĝo de **Danica Bedeković** kiu verkis la unuan kroat-esperantan vortaron, la temo pri la vortara farado ŝajnis tute trafa.

Enkonduke la prelegantojn kaj la interesatan publikon salutis **Marija Belošević**, sekretario de KEU kaj membro de la AMO-komisiono. Mallonge ŝi prezentis la historion kaj celojn de la seminarioj kiuj i.a. strebas al t.n. permanenta edukado de E-aktivuloj. Ŝi transdonis la salutojn de **Stefan MacGill**, respondeculo de AMO-seminarioj.

Dum la unua tago okazis ses prelegoj.

*"Mia vortaro kompilata laŭ la ĉineska lingveco kaj Minifrazoj el rakontoj far ĉina filozofo Hanfizio (a.K. 280-233)" estis titolo de la kontribuoj de **Tianyi WANG - Ĉielismo (Ĉinio)**. Kiam li komencis kompili la vortaron ĉina-esperantan, li konsciis, ke lia vortaro devas ia vortaro devas konsideri la ĉinan lingvecon, ankaŭ laŭ vortofinoj, kvankam la tradicia vortaro aranĝas vortojn nur laŭ vortokapo kiel eŭropa kutimo. Li montris kelkajn ekzemplojn. Lige al la dua parto de la kontribuo, li atentigis, ke en lia vortaro estas ĉineskaj vortoj el antikvaj literaturistoj, ekz. filozofo Hanfizio (280-233 a.k.), kiu i.a. donis al la ĉina lingvo diversajn minifrazojn. Per kelkaj ekzemploj, Ĉielismo klarigis pri kio temas.*

Kontribuante al la programo, **Potturu Ranganayakulu (Barato)** per prelego *"Vorto, Frazo kaj Cerbo"* aliris la ĉeftemon de medicina vidpunkto. Por li la demando 'kiel la cerbo traktas lingvon' estas pli interesa ol 'kiajn rilatojn la lingvoj havas inter si'. Oni sentas ke la lingvistiko estas relative nova disciplino, sed jam de miloj da jaroj la homo estis debatanta pri neŭrolingvistikaĵoj. Dank' al moderna neŭrologio, ni povas iom kompreni kiel la lingvo estas traktata de la cerbo. Ĉio ĉi estonte helpos plibonigi nian komunikon inter lingvoj kaj eĉ perfektigi artefaritan inteligentecon.

Prelegon *"Vortfarado, terminologio, vortaroj en la radia laboro"* kun pluraj praktikaj ekzemploj prezentis **Barbara Pietrzak (Pollando)**. Dum la prelego ŝi trarigardis la

historion de la E-elsendoj de Pola radio kaj kiel oni traktis la lingvon. Tiel laŭ etapoj oni povas sekvi la evoluon de la lingvo mem, sed ankaŭ

Katalin Kovats (Nederlando) kontribuis per la prelego "*Leksiko de modernaj lernoaplikaĵoj*". Enkonduke ŝi atentigis, ke la vortaroj havas plenan sencon, se oni praktike uzas ilin, ke la vortaroj ne estu loko de arkivado. Sia prelegon ŝi apogis je pedagogiaj spertoj/bezonoj - praktika uzeblo de uzo de vortaroj, kreo de vortolistoj. Rigardante al la historio, ŝi donis superrigardon pri la metodoj kaj karakterizoj pri uzado de leksiko inter kiuj iuj strikte preskribis la necesajn vortojn, dum aliaj lasis pli da libero al la instruisto. Interesulojn pri la analizoj kaj studoj de lernolibroj kaj vortaroj ŝi direktis al la portalo edukado.net.

Dum dua parto de la prelego ŝi prezentis kelkajn apojn per kiuj eblas lerni E-vortojn kaj esprimojn. Ŝi atentigis, ke la modernaj generacioj pli uzas tiujn ilojn, kaj multaj venas al la movado ĝuste lerninte per ili. Aparte ŝi prezentis apojn: TeachKidsLanguages.com, utalk.com kaj languagedrops.com.

Ivan Bekavac Basić (Kroatio) prezentis la vivon kaj verkon de la kroata latinisto, vortaristo kaj Esperantisto Jozo Marević. Marević (1940-2021). Li aŭtoris plurajn librojn, artikolojn, prelegis ĉe internaciaj konferencoj. Kiel rekono de lia grava laboro, oni atribuis al li altrangajn kroatajn premiojn. Lia lasta kaj la plej ampleksa verko estas la "**Oklingva medicina enciklopedia vortaro**" (lingvoj: latina, angla, franca, germana, hispana, itala, kroata, Esperanto). En la recenzo kiun oni povas trovi en "Revuo Esperanto" (majo 2017), oni atribuis al ĉi-tiu eldonaĵo la titolon de "La plej granda Esperanto-libro".

Plurlingvan vortaran projekton prezentis ankaŭ **Tatjana Audeskaja Viktorovna (Ukrainio)**. Nome, ŝi prilaboras ses lingvan ilustritan "*Biologian vortaron: rusa-latina-Esperanta-angla-germana-hispana*". La celo estas per bildoj klarigi kaj proksimigi konatajn kaj nekonatajn fiŝojn, amfibiojn, reptiliojn, birdojn, moluskojn, mamulojn. (Pli da informoj: vortaro.zzz.com.ua).

La prelegserion de la dua tago malfermis **Renato Corsetti (Britio)** kiu en sia prelego ŝerce titolita "*Esperanto sine flexione*" deziris atentigi, ke Esperanto enhavas amason da latinaĵoj, kiuj estas tute fremdaj por nekatolikaj neokcidenteŭropaj Esperantistoj. Normale, al tiuj latinaĵoj ankaŭ aldoniĝas grekaĵoj. Li donis plurajn ekzemplojn kiujn oni trovas en PIV kaj kiuj laŭ la priskribo ne estas komprenataj tutmonde. Tial prave oni povas starigi la demandon: ĉu Esperanto estu lingvo nur por eŭropanoj aŭ por la tuta mondo. Corsetti prezentis la projekton de la malgranda grupo da Esperantistoj kiuj laboras por tio, kion ili nomas laŭ la libro de Claude Piron "La bona lingvo". T.s. la lingvo parolata de simplaj Esperantistoj, kiuj estas nek verkistoj, nek intelektuloj, nek lingvistoj, nek poetoj; la lingvo parolata de tiuj, kiuj ne volas plibonigi Esperanton kaj ne volas aldoni esceptojn al ĝi. (Pliaj informoj: <http://bonalingvo.net/>)

Rob Moerbek (Nederlando) preleginte pri "*PIV kaj korektado*" donis amaso da ekzemploj. Li atentigis, ke la vortprovizo en Esperanto pro la kombineblo de elementoj (morfemoj) estas neelĉerpebla.

Sed lingvoj evoluas. Ni komparu kun amebaj kiuj elŝovas "braketojn" ĉiudirekte, foje progres-decide foje ne. Ofte eblas ĝoji pro trafa neologismo, sed plejofte rezultas

unufojaĵoj. Por PIV, Moerbek diris, ke "ĝi estas plurteme vera enciklopedieto. Ĉe kemio, plantoj, bestoj, la evoluo de la vivo, sed ankaŭ lingvaj figuroj ktp, ni trovas lernindajn informojn. Ofte kun fontindiko aŭ citaĵo." Sed li atentigis, ke ankaŭ PIV devas akompani la evoluon, kiun do sekvas la reta vortaro, sed ekzistas homoj kiuj preferas la paperan eldonon. Por ĉi lastaj utilas listoj de korektoj.

Alberto García Fumero (Kubo) enkonduke, la partoprenantojn "ĉiĉeronis" tra hispana lingvo kaj atentigis pri malsimilaĵoj de unuopaj signifoj en diversaj hispanparolataj landoj. Surbaze de tio li klarigis neceson pri la nova vortaro kiu atentis pri tiuj malsimilaĵoj. La projekto ne estas nova, tamen la projekton kiu finfine realiĝis, revivigis kostarikano Guido Hernández Marín. La preleginto mem eniris la projekton en la jaro 2010. La laboro daŭris kvar jarojn, kaj aperis la vortaro kiun eldonis Monda Asembleo Socia. La unue elpensita titolo estis Amika Vortaro, ĉar ĝi, krom esti "amika", estas farita de amikoj. Tio ne eblis; jam ekzistas alia, tiunoma vortaro. Ĉar ni ĉiam aludis al ĝi kiel "*Nia Vortaro*" (pli ĝuste estus diri "nia ideo pri tio, kia povus esti vortaro, aŭ kia ni ŝatus, ke estu vortaro"), estis tute nature, ke fine ĝi alprenu tiun nomon.

La *Slovena-esperantan vortaron ĉe la vortara portalo Termania* prezentis **Janez Jug (Slovenio)**. La portalo estas libere alirebla, senpaga kaj unuavice destinita por serĉado en vortaraj datenbankoj. Tie oni trovas pli ol 100 vortaroj. Parolinte pri la Slovena-esperanta vortaro trovebla ĉe la portalo, li klarigis ke temas pri al vortaro kiun kompilis Mica Petrič (1903-1985). Ŝi komencis okupiĝi pri la vortaro en 1954. La vortaro (558 p.) presforme estis eldonita en la jaro 1963. Post ŝia morto, la plibonigitan manuskripton ricevis Slovenia Esperanto-Ligo. En la jaro 2017 ekis la preparo de la elektronika vortaro pri kio kunlaboris SEL, Esperanto-societo Ljubljana kaj entrepreno Amebis kiu zorgas pri la portalo Termania.net. La elektronika eldono kun 42350 kapvortoj aperis en julio 2018. Oni daŭre plibonigas la enhavon kaj aldonas novajn vortojn. Momente la vortaro enhavas 44150 vortarartikojn. Gravas, ke ankaŭ la uzantoj rajtas komenti kaj atentigi pri la eraroj.

La elektronika E-vortaro estas grava ne nur kiel vortaro, sed same kiel propagandilo, ĉar en la menuoj inter la lingvoj oni trovas Esperanton.

La portretojn de "*Du kroataj E-vortaristinoj: Danica Bedeković kaj Lucija Borčić*" prezentis **Krešimir Belošević (Kroatio)**.

Danica Bedeković (7.6.1872 - 25.3.1955) estis kroata esperantistino, instruistino, ĵurnalistino, katolika aktivulino. Pri Esperanto ŝi eksciis en 1903, ellernis ĝin en 1905. Ŝi estis unu el la fondintoj kaj la unua vicprezidantino de Društvo hrvatskih esperantista (Societo de kroataj Esperantistoj). En la jaro 1909 ŝi pretigis du gravajn librojn „Gramatika esperanta“ (apero: majo 1909) kaj iom pli poste, dum julio aperis la vortaro „Esperanto- hrvatski rječnik“. La enkondukon de la 296 p. vortaro verkis la prezidanto de la Societo Mavro Špicer, kiu i.a. skribis „ni kroatoj estas la unuaj kaj ĝis nun solaj kiuj posedas plene esperantan vortaron kun la riĉa enhavo de multaj vortoj kiujn ni vane serĉos ĉe aliaj popoloj.“ En la jaro 1921 aperis ŝia 93 p. Kroat-esperanta vortaro, kiu brajle aperis en Zemun en 1925. Danica Bedeković ankaŭ redaktis la kroatan gazeton „Kroata esperantisto“, ŝi gvidis la kursojn, tradukis de la kroata al Esperanto, kaj partoprenis plurajn aranĝojn inter la du mondmilitoj.

Lucija Borčić (26.7.1921. - 14.11.2015) ĝis emeritiĝo ŝi estis oficistino de la Plastikarta Asocio de Kroatio. Ŝi esperantiĝis en la jaro 1940 kaj de la jaro 1946 aktive partoprenis en la movado. Ŝi gvidis diversgradajn kursojn, kaj plenumis diversajn funkciojn ĉe la loka kaj nacia niveloj. Ŝi estis honora membro de la Universala Esperanto Asocio (2001) kaj membro de la Akademio Literatura de Esperanto (iama Esperantlingva Verkista Asocio). Lucija Borčić dum sepdeko da jaroj donis nemezureblan kontribuon al la disvastigo de la kroata kulturo, ĉefe la verkita vorto. Ŝi estis la plej fruktodona tradukistino de la kroata literaturo al Esperanto kaj inter la plej fruktodonaj kroataj tradukistoj ĝenerale. Ŝia vivverko estas duvoluma vortaro kroata-esperanta kaj esperanta-kroata. En la jaro 2008 aperis "Granda vortaro esperanto-kroata" kiu inkluzivas 15.545 kapvortojn kaj 26.353 derivaĵojn, entute 41.898 leksikajn unuojn. Jaron poste aperis "Granda vortaro kroata-esperanto" kun 52.400 kapvortojn kaj derivaĵojn kaj kunmetitajn vortojn, entute ĉirkaŭ 57.000 leksikajn unuojn.

Konklude: Danica Bedeković kaj Lucija Borčić per siaj tradukoj kaj vortaroj dum cento da jaroj postlasis neforgeseblajn spurojn por la kroata Esperanto-kulturo.

Fine de la prelegoj oni prezentis du filmetojn teme ligitajn al la Nacia kaj universitata biblioteko en Zagrebo. La unua, estas la filmeto de la Biblioteko kiu koncize prezentas la agadkampojn de la biblioteko. La duan filmeton pretigis Kroata Esperantista Unuiĝo okaze de 94-a AMO-seminario kies temo estis "Kolektado kaj arkivado de Esperantaĵoj". Ĝi celas prezenti Esperantaĵojn en la biblioteko kaj konsciigi pri Esperanto kiu estis enskribita en la listo de la nemateria kultura havaĵo de Kroatio. Programo de la dua tago finiĝis per la koncerto de **Ĵomart kaj Nataša (Svedio)**.

La lasta tago de la Memorialo estis tradicie dediĉita al Lucija Borčić. Oni memoris pri ŝia vivo kaj nemezurebla kontribuo al la diskonigo de la kroata kulturo pere de Esperanto.

Tradicie je tiu tago okazas la proklamo de la laŭreatoj de du konkursoj.

Al la ĉi-jara, 6-an Traduk-konkurson "Lucija Borčić" 2022 alvenis naŭ proz- kaj 13 poemtradukoj. Laŭ la regularo la tradukojn oni povas fari de iu ajn lingvo al Esperanto. Sekve ĉi-jare la tradukoj estis prezentitaj de la angla, bulgara, greka, hungara, itala, rumana kaj rusa lingvoj, kaj de la napola dialekto. La konkursantoj estis el jenaj landoj: Germanio, Italio, Portugalio, Rumanio, Ukrainio. (V. aldone la premiojn). Ĉi-okaze oni prezentis la rezultojn de la 3-a foto-konkurso "Kroatio de via okulo". Al la konkurso venis 62 fotoj kiujn Esperantistoj el Bosnio kaj Hercegovino, Francio, Germanio, Hungario, Italio kaj Koreio fotis en Kroatio. (v. aldone la premiojn).

La tuta aranĝo estis finita per la piankoncerto de **Maggy Combot (Reunio)**.

Marija Belošević